

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Clarence Bicknell

Jen la lasta rozeto de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu rozflor'
Partoprenas kompate en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte formortus mi mem,
Se ne plu min atendus amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola sen amo-respond'?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (*1842-10-27 - †1918-07-17).*

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C._,_Bordigheza.

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.